

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2011

Mardon la 18an de januaro

59a jaro

Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / Hvor? – vd. malsupre / se nederst)

Lundon la 17an de januaro (semajno / uke 3) – *mandag*

Ĉu vi povas legi la ŝildojn en Grønland kaj Tøyen? Ida Brenna studas la araban. Ŝi rakontos pri la lingvo, kaj respondos demandojn.

Kan du lese skiltene på Grønland og Tøyen? Ida Brenna studerer arabisk. Hun forteller om språket og svarer på spørsmål.

ĴAŬDON la 27an de januaro (semajno / uke 4) – **TORS DAG**

NEL 100-JARA!

Norsk Esperanto-Forbund 100 år!

Malferma pordo la tutan tagon

Åpent hus hele dagen

Kuko kaj ĉokolado

Kake og sjokolade

Lundon la 7an de februaro (semajno / uke 6) – *mandag*

La 6a estas la samea nacia tago. Ni kolektos gazetartikolojn tiurilatajn kaj diskutos ilin.

Den 6. er samenes nasjonaldag. Vi samler avisartikler i sakens anledning og diskuterer dem.

Lundon la 21an de februaro (semajno / uke 8) – *mandag*

La Tago de la gepatra lingvo. Ni kolektos ekzemplojn de la influo de diversaj gepatraj lingvoj sur el-parolo, vortelektio kaj frazstrukturo en Esperanto.

Den internasjonale mors- (og fars-?) målsdagen. Vi ser på morsmåls-påvirkningen hos brukere av esperanto – på uttale, ordvalg og setningsstruktur.

Lundon la 7an de marto (semajno / uke 10) – *mandag*

JARKUNVENO. Vd. la 3an paĝon.

ÅRSMØTE. Se 3. siden..

Lundon la 21an de marto (semajno / uke 12) – *mandag*

Ni interŝanĝas spertojn kaj ideojn pri metodoj por pli bone paroli kaj skribi Esperanton.

Vi utveksler erfaringer og ideer om metoder for å snakke og skrive bedre esperanto.

OkazIS

Lundon la unuan de novembro

La t.n. socialajn mediojn uzas nuntempe ankaŭ multaj organizoj. Ankaŭ ĉe UEA estas grupo en Vizaĝopaĝo (*Fjesbok*) kun pli ol 1500 "amikoj". En alia tia retejo, Iperno (*Ipernity*), oni povas elekti inter multaj lingvoj, inter ili Esperanto. Alia tendenco nuntempe estas ke homoj ne volas membri en la tradiciaj organizoj. Ni interŝanĝis sciojn kaj spertojn pri la novaj socialaj retejoj kaj diskutis ĉu ili iom post iom transprenos la funkciojn de niaj landaj asocioj (kiel NEL).

Lundon la 15an de novembro

Ni trarigardis la tri malnovajn broŝurojn el 1952 kaj 1967 pri Oslo por prijuĝi kiujn tekstojn konservi en nova broŝuro kaj kiujn modernigi aŭ anstataŭigi. Ni ankaŭ notis novajn menciindaĵojn, kiel la unika situo de la urbo inter fjordo kaj

arbaro, kaj la arbaraj limoj, kiuj kanaligas la vastiĝon de la urbo en tri direktoj.

Lundon la 6an de decembro

Ni daŭrigis la pritakson de la enhavo de la malnovaj broŝuroj.

Merkredon la 15an de decembro.

La Zamenhofa Tago kaj literatura kunveno. Ni kune prezentis kaj iom diskutis librojn kiuj iel gravas por ni kaj voĉlegis el ili: la studlibro *Paŝoj al plena posedo*, la klasika vojaĝrakonto *Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto*, la legolibro de Rosbach *Bagatelaro kaj Kelkaj faktoj pri Budhismo* de Gunnar Gällmo.

Lundon la 17an de januaro

Estis granda intereso por aŭskulti Ida klarigi la misterojn de la arabaj alfabeto kaj elparolo.

DD

NEL centjariĝos / Norsk E-Forbund 100 år ĵaŭdon / torsdag 27. januaro

Norvega Esperantista Ligo fondiĝis antaŭ cent jaroj, la 27an de januaro 1911. La klubo en Kristiania fondiĝis la unua fojon jam en 1906 (sed endormiĝis en 1910 kaj refondiĝis en 1916). En Trondheim fondiĝis Grupo Esperantista en 1907.

Sed la unua informa kaj instrua agado en Norvegio datiĝis de 1896, post kiam Haldor Midthus (Os en Hordaland) vizitis la klubon en Uppsala (kun tiu de Nürnberg la unuaj E-kluboj en la mondo). Kaj la plej fruaj norvegaj nomoj en la internacia Listo de novaj esperantistoj aperis en 1891, do nur kvar jarojn post la apero de la *Unua Libro*. (Vd. *N-E-isto* 8/1955, 7 kaj 9-10/1961 kaj 5-6/1962.)

Internacie la movada pezocentro transiris ĉe la jarcentŝanĝo de disaj rusaj tolstoĵanoj kaj aliaj idealistoj al la intelektula medio en Francio, kie okazis la unua Universala Kongreso en 1905. UEA fondiĝis en 1908.

Det er planer om å markere jubileet på Nordstrand.

På Esperantonia på Sinsen holder vi åpent hus (kake og sjokolade!).

Jarkunveno / Årsmøte, lundon / mandag 7. marto

Tagordo / Dagsorden

1. Aprobo de la kunvoko
2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.
3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retpoŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)
4. Jarkalkulo (same)
5. Ricevitaj proponoj.

Du statutŝanĝojn en §8 proponas Cato Haugen:

- a) la prezidanto estu la kluba reprezentanto en la domkomisiono kaj la sekretario korespondanta ties anstataŭanto.
 - b) ... la elekta komisiono konsistu el almenaŭ unu membro (nun du).
6. Elekto de estraro, revizoro kaj (se 5 a ne estos akceptita) reprezentanto en la domkomisiono, kaj nova elekta komisiono. ĉiuj kun anstatuanto(j) ,

1. Godkjennelse av innkallingen.
2. Valg av møteleder og referent.
3. Årsrapport.(sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den.)
4. Årsregnskap. (sendes på samme måte)
5. Innkomne forslag .
Cato Haugen fremmer to forslag til vedtektsendringer i §8:
 - a) lederen er klubbens representant i huskomiteen og den ene sekretæren er vara
 - b) .. valgkomité, bestående av minst ett medlem (nå to)
6. Valg:av styret, revisor og (dersom 5a ovenfor ikke blir vedtatt) representant i huskomiteen – alle med vara.

ĈU VI HAVAS PROPONON por la jarkunveno? Ĝi atingu la estraron plej malfrue tri semajnojn antaŭ la kunveno – t.e. lundo de semajno 7 aŭ la 14a de februaro. (Por statutŝanĝoj la limdato estis jam 10. januaro.)

HAR DU FORSLAG til behandling på årsmøtet? Styret må ha det senest tre uker før møtet, dvs. mandag 14. februar. (For vedtektsendringer var fristen 10. januar.)

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Nova libro de Lars Forsman

Esperanto ... 50 milojn trafas

La nova libro de Lars Forsman (vd. *Norvega Esperantisto* 6/2010, dorsa paĝo) pri lia 18-jara sperto kiel instruisto pri Esperanto en la popola altlernejo de Karlskoga, **vendas nia klubo por 95 kronoj.**

Den nye boken til Lars Forsman (se Norvega Esperantisto 6/2010, bakside) om hans 18 års erfaringer som lærer i esperanto på Karlskoga folkehøyskole, er til salgs i klubben for 95 kroner.

La verko baziĝas sur propraj praktikaj spertoj de la aŭtoro. Li profunde konas la temon. Ĝuste la prezentmaniero faras la libron tre alloga. Leganto ne emas lasi talentan akompanon de Lars Forsman, kiu vokas al vigla kaj verva rakontado pri la lingvo mem, ĝia instruado kaj utiligado en tutmondaj kadroj.

Jorma Ahomäki ĉe edukado.net

Ni vendas librojn, insignojn, glumarkojn

Krom libroj (lernolibroj, vortaroj, literaturo) nia klubo vendas i.a. ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj; kaj diversajn insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Ankaŭ (svedajn) kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto" kaj en parolveziko. (Videblas interrete ĉe esperanto.se).

Postkongreso en Oslo 2011

Kelkaj klubanoj planas tri-tagan turisman postkongreson en Oslo post la Universala Kongreso en Kopenhago venontjare. Se vi interesiĝas helpi, bv. turni vin al Cato Haugen <[pluto8008\[a\]gmail.com](mailto:pluto8008[a]gmail.com)> poŝtlf. 452 88 435.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <[oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).